SOVETIA ESPERANTISTA JUNULARA MOVADO

# Aktuale

## SEJM

Esperanto servu pacon

A K T U A L E

Monata informilo de Sovetia Esperantista Junulara Movado

La agadjaro 1977/78 N-o 8(52) Aprilo

PLENSUKCESIGI NIAJN AMASAJN ARANĜOJN
(responde al V.Ebel kaj V.Vjazovcev)

Venis printempo, kaj la esperantistoj jam forblovas polvon de valizoj kaj dorsosakoj, prepariĝante al la majaj regionaj renkontiĝoj kaj la someraj tendaroj. Atendo de baldaŭaj renkontiĝoj ĉiam estas ĝoja kaj por spertaj esperantistoj kaj por la novicoj. La spertuloj antaŭĝuas eblecon denove post longa vintra izoliĝo mergi sin en la karan amikan etoson, ĝissate paroli en Esperanto, interŝanĝi la sperton de agado. La komencantojn allogas nur sola vorto "Esperantujo", pri kiu ili dum tuta jaro timetis eĉ revi.

Por ni, organizantoj de la aranĝoj, al la kutima ĝojo miksiĝas maltrankvilo: ĉu ne okazos ĉi-foje nia Esperantujo teda kaj laciga por spertaj esperantistoj, kaj por komencantoj - senutila kaj neallloga? Ni ne allasu tion, tial ni devas anticipe pensi, kion fari por ke estu niaj tendaroj kaj renkontiĝoj plensukcesaj.

En kadroj de unu artikolo certe ne eblas prilumi ĉiujn flankojn de la problemo, kaj mi volas tuŝi nur apartajn.

La ĉefa, kio malkontentigas multajn niajn aktivulojn, estas ne tre alta lingva nivelo kaj manko de lingva disciplino en la tendaroj. La kamaradoj serioze meditas kaj demandas, pro kio tio okazas kaj kiel eviti la mankojn. La plej gravajn kialojn oni vidas en: 1) abundo de homoj, kiuj "ne estas eĉ komencantoj" kaj kiuj "malutilas, eĉ malhelpas al la tendaro"; 2) malbona organizo de Paroliga ("marŝiga, anekdota, krokodiliga") periodo; 3) ne tre serioza rilato de instruistoj al"sia sankta devo". Konforme al tio estas proponataj diversaj rimedoj por solvo de la problemo. Prikonsideru ni la proponojn kaj provu trovi optimumajn variantojn. °

<u>Pri abundeco de "krokodiloj".</u> Por ĝin eviti, ĝis nun estis praktikata fakte nur sola rimedo: apelo al konscienco de klubestroj - rekomendantoj. Kiel montris la sperto, tio restas senefika. Aŭdiĝis ankaŭ pli "radikalaj" proponoj: "severe rilati al la fuŝrekomendoj" kaj eĉ "forpeli arogajn krokodilojn el la tendaroj". La unua el la proponoj estas tro nebula, la dua - tro rigora...

Sed la solvo povas esti sufiĉe simpla. Necesas verŝajne fiksi optimuman proporcion inter diversnivelaj tendaranoj kaj firme sekvi ĝin. Ideala proporcio evidente estus jena: por unu bone parolanta esperantisto - unu kontentige parolanta kaj unu parolanta elemente. Eble ni proponu diversajn proporciojn por diversaj kategorioj de la kluboj, ekzemple: por "A" kaj "B" - 1:1:1, por "C" - 1:2:3, por la kluboj-kandidatoj - 1:3:4. Por efektivigi tiun sistemon, necesas nur anticipe averti la klubestrojn, ke la aliĝiloj de la kluboj estos akceptataj nur en tia proporcio, "superfluaj" aliĝiloj estos simple revenigataj. Tia rimedo vere postulus de la klubestroj "selekton de aliĝantoj" kaj evitigus la faktojn, ke aktivuloj de apartaj kluboj veturas al la konferenca tendaro, sed komencantojn sendas al la alia (kiel pasintjare faris ekzemple Omska kaj Talgara kluboj).

Individuajn esperantistojn laŭ mi necesas trakti tiel: se la kamarado aliĝas unuafoje - akcepti lin nepre (ĉar li estas potenciala fondonto de nova E-klubo), se jam ne unuan fojon - kondiĉe ke en pasintaj tendaroj li montris sin sufiĉe aktiva kaj disciplinema.

Kiel punrimedo por "arogaj krokodiloj" estis proponita forpreno de poentoj de la kluboj, kiuj liveras tiajn "hipopotamojn". La propono al mi ŝajnas taŭga (ekzemple, -10 poentoj pro ĉiu rompanto de lingva disciplino).

Pri Paroliga periodo. Ĝi estas, laŭ mia opinio, unu el la plej brilaj elpensoj de SEJM-anoj. En idealo ĝi estas la plej taŭga formo por lingva perfektigo de novaj esperantistoj. Ĉiuj mankoj, kiujn ni havis ĝis nun en tiu ĉi sfero, estis simple pro nesufiĉa sperto en organizo de la aranĝo. PP estis efektivigita fakte nur dufoje: en SEJT-18 kaj OrSEJT-19 (la unua provo en SEJT-17 fiaskis).

Do, kiajn mankojn ni havis en la estintaj PP-oj? En Tiĥvina PP tiuj estis: nesufiĉa kvanto de spertaj esperantistoj, kion kaŭzis la SEJM-Konferenco samtempe kun PP; malbone ellaboritaj vojplanoj kaj manko de lokaj turistaj gvidantoj, pro kio la grupoj multan tempon perdis pro misvagoj. En Miassa PP ĉi-rilateestis sola manko: tro komplikaj vojplanoj, pro kio iuj kamaradoj "lamentis pro longa marŝado kaj 'azena' tendotrenado", aliaj ekvidis en tio vanan perdadon de la "valoregaj PP-horoj". La problemo estis starigita klare: ĉu marŝi dum PP aŭ sidi pogrupe en diversaj lokoj (aŭ "oficiale" en la tendaro) kaj tutan tempon dediĉi nur al instruado?

Mia opinio estas : dum ni ne havas unuecan programon kaj rekomendojn por PP (ŝuldo de la Instrua fako!), ni rajtigu ĉiun grupestron memstare elekti por sia grupo tiun aŭ alian formon de PP (certe kun anticipa interkonsento inter la grupestro kaj Klubo-Mastro).

Mi ekzemple, kiel grupestro de PP, nenjam konsentus sidi kelkajn tagojn sur la sama loko. Tio estus laŭ mi tro enua. Krome mi preferas naturan formon de paroligo dum PP. Interalie, k-do Vjazovĉev ne tute ĝuste komprenis la esprimon "instruado en naturaj kondiĉoj". Tio signifas ne nur instruadon eksterurbe, en arbaro, sed unuavice - ne lecionan, sed liberan formon de paroligo dum ĉiutaga komuna vivo kaj interkomunikado de la grupanoj. Ĉe tiu formo sola grupestro nenion atingos. Por sukceso de la entrepreno necesas havi en la grupo bonan proporcion inter spertaj kaj komencantaj esperantistoj. Ju pli multe da bone parolantaj grupanoj - des pli rapide ekparolos la aliaj. (Spertuloj, konsideru tion kaj ne evitu PP-ojn - vi estas tre bezonataj tie!) Certe devas esti ankaŭ specialaj instruhoroj, sed nelongedaŭraj (ne pli ol 2 horoj ĉiutage) kaj interesaj por ĉiuj, prefere en luda formo ("Amuza gramatiko" de A.B.Rogov prezentas riĉegan materialon por tio). Do estas evidente, ke por la "natura formo" surloka sidado tute ne taŭgas: ju pli aktive kaj varie vivos la grupo, des pli interesa kaj lingve utila interkomprenigo estos en ĝi. Krome, ni ne forgesu pri agrableco de niaj aranĝoj. Veturi milojn da kilometroj al belegaj Uralaj aŭ Altajaj montoj por sidi tie kvin tagojn sub arbedo kaj remaĉi gramatikajn regulojn estas ne brila perspektivo eĉ por komencantoj.

Pri la instruistoj. Ili estis riproĉitaj pro du "pekoj": pro "instruo sen preciza programo kaj sen rezulto" kaj pro tio, ke "anstataŭ ĉiun liberan minuton utiligi lingve, oni preferis uzi ĝin por naĝado, pilkado aŭ freŝa anekdoto". Pri la programo - pli ĝuste, pri ĝia neekzisto - jam temis supre; kio koncernas la duan riproĉon, ĝi estas laŭ mi ne tre justa. Instruistoj ja ne estas aŭtomatoj, ili ne povas senĉese labori. Finfine ili venis al la tendaro ankaŭ por refreŝigi, sed ne por perdi siajn sanon kaj fortojn. Do ni ĉiuj multe ripozu en la tendaroj: naĝu, sunbruniĝu, ludu, ridu - por poste dum la jaro kun novaj fortoj kaj humoro daŭrigi la batalon por nia nobla ideo. Sed la ĉefan kondiĉon ni konstante devas sekvi: labori kaj amuziĝi nur en Esperanto.

Lingva nivelo kaj lingva disciplino en la tendaroj estas nia interna problemo. Sed mi volus kelkajn vortojn diri ankaŭ pri la "ekstera". Temas pri soci-politika resono de niaj renkontiĝoj. Nia movado estas socia fenomeno, pri tio ni devas ĉiam memori organizante niajn amasajn aranĝojn. Precipe tio koncernas la regionajn renkonti-

ĝojn, kiuj kutime trapasas en urbaj kondiĉoj. Ni devas konvinki la socion, ke ni estas homoj, kiuj vere batalas por la plej noblaj idealoj de la homaro: paco, interpopola amikeco, socia progreso.

De tiu ĉi vidpunkto modela estis CRRER-16, okazinta la 6-an - 8-an de novembro en Ivanovo. Ĝia programo enhavis tiajn gravajn erojn, kiel partopreno en la festa urba manifestacio, vizito al memoriala komplekso "Ruĝa Talka" kun meto de floroj al la monumento kaj komuna fotado ĉe Eterna fajro, prelegoj de aktivuloj pri la temoj "60-jara jubileo de Oktobro kaj aktualaj taskoj de junularaj E-kluboj" kaj "Partopreno de soveta esperantistaro en la pacmovado", kolekto de mono por Pacfonduso, subskribo de salutleteroj al lokaj oficialaj instancoj.

Eblas ankoraŭ variigi formojn de soci-politikaj kaj soci-utilaj aranĝoj en kadroj de niaj renkontiĝojn, sed organizi tiajn aranĝojn necesas nepre. Mi memorigas la ĉefan temon por la majaj regionaj renkontiĝoj kaj someraj tendaroj - "60-jariĝo de VLKSM kaj sovetaj junularaj E-kluboj" (rigardu la artikolon de A.Melnikov en "A"-3, p.31-33).

Fine mi deziras al la organizantoj de la estontaj renkontiĝoj riĉan fantazion, vulkanan energion, firmecon en la streboj kaj postuloj. Sukceson al vi!

L.Novikova, v/p pri renkontiĝoj.

## I N F O R M I L O №1
## pri la 20-a Okcident-Sovetia Esperantista Junulara Tendaro (OkSEJT-20)

<u>Loko.</u> La 20-a OkSEJT, dediĉita al la 60-jara jubileo de VLKSM kaj la XI-a Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj, okazos en Dagestana ASSR en pitoreska Bujnakska regiono (ĉ. 60 km de la urbo Maĥaĉkala).

<u>Tempo.</u> La tendaro daŭros 12 tagojn: la 7-an - 18-an de aŭgusto 1978.

<u>Kondiĉoj.</u> La partoprenontoj de la tendaro loĝos en turistaj kondiĉoj, t.e. tendoj, dormosakoj, komuna kaldrono ktp.

<u>Partoprenrajto.</u> La tendaron rajtas partopreni anoj de SEJM-kluboj kaj subtenantaj kluboj, krome - aliaj esperantistoj en aĝo ĝis 40 jaroj; ĉiuj aliĝantoj devas esti parolkapablaj esperantistoj kaj nepre havi rekomendon de SEJM-Konsilantarano. La kluboj plene respondecas pri la lingva nivelo kaj disciplino de la rekomenditoj.

<u>Programo.</u> En la programo estas planataj: E-instruado en ĉiuj niveloj, dediĉa mitingo, prelegoj, konkursoj, festoj, ekskurso kaj aliaj interesaj kaj agrablaj programeroj.

<u>Kotizo</u> estas duparta: a) <u>aliĝlotizo</u> (por organizaj elspezoj) - 4 rub. por lernantoj, 5 rub. por studentoj, 6 rub. por ceteraj; b) <u>partoprenkotizo</u> - 3 rub. por ĉiu partoprentago (manĝado, litaĵoj).

<u>Adresoj kaj telefonoj.</u>

1. Junusov Abduraĥman Gaĝijeviĉ, prezidanto de la Prepara Komitato - 367012 Maĥaĉkala, ab. ja. 074; tel. oficaj 71273, 70386.
2. Aĥlakov Magomed Ismailoviĉ, vicprezidanto - ul. Sovetskaja 20 - 40; tel. 76883.
3. Aĥlakova Zilja Ŝamiljevna, sekretariino - la samaj.
4. Bogoslovskaja Galina Nikolajevna, respondeculino pri la programo - adreso la sama kiel ĉe 1.
5. Rusanov Vladimir Ivanoviĉ, membro de la Prepara Komitato - ul. 26 Bakinskiĥ komissarov 80a - 3; tel. 25779.

La kotizojn kaj parton "A" de la aliĝiloj sendu pogrupe al A. Junusov (adreso supre), parton "B" - al Novikova Ludmila Leonidovna - 456323 Miass Ĉeljabinskoj obl., ab. ja. 25.

La kotizoj kaj aliĝiloj estas akceptataj ĝis la 1-a de junio. Ekstrema limdato - la 15-a de junio.

Ĉiujn (sin)proponojn pri la programo de la tendaro sendu al A. Junusov kaj G.Bogoslovskaja (adreso supre).

Personoj, neglektontaj la tendaran kaj lingvan disciplinon, estos eksigataj el la tendaro.

Veno por neplena tendara periodo estas ebla, sed nedezirinda. La nevenintoj, kiuj frue avertos, rericevos la parton "b" de la kotizo kaj la tendarajn atributojn (insigno, emblemo ktp).

T e n d a r a   K o m i s i o n o .

## TENDARAJ LABOROJ EN OrSEJT-20

En la tendaro estas antaŭvidataj jenaj laboroj:

1.Adiaŭa maskobalo (organizi). 2.Akvosekuriga servo. 3.Artaj prezentoj (organizi la konkurson). 4.Aŭtografoj (organizi la kolektadon). 5.Bela lego (organizi la konkurson). 6.Biblioteko (gvidi). 7.Butiko tendara. 8.Dancoj (organizi). 9.Deĵorado tuttaga en: a) kuirejo, b) tendarejo, c)fajrejo. 10.Deĵorestro. 11.Deklamarto (organizi la konkurson). 12.Ekspozicioj (organizi). 13.Ekzamena komisiono (ekzameni progresantojn). 14.Enciklopedio tendara (verki). 15.Festo de naskiĝintoj (organizi). 16.Fiŝkaptista konkurso (organizi). 17.Fotado komuna (organizi). 18.Fotoservo. 19.Gaja vespero (organizi kaj gvidi). 20.Gimnastiko matena (gvidi). 21.Gitarmuziko. 22.Ilustra grupo. 23.Infana grupo (gvidi E-programon). 24.Interkona vespero (organizi kaj gvidi). 25.Interpretista konkurso (organizi kaj gvidi). 26.Kantoj (instrui). 27.Klubo de Gajaj kaj Spritaj (organizi la programon). 28.Komsomolestro. 29. Koncertoj (prepari programerojn). 30.Koncerto por aborigenoj (organizi). 31.Kuiristo. 32. Laborbrigado antaŭtendara. 33.Labortago en apuda kolĥozo (organizi). 34.Lingva komisiono. 35.Loterio (organizi kaj gvidi). 36.Lumbilda vespero (organizi). 37.Magnetofona servo. 38.Manĝejestro. 39. Medicina servo. 40."Miss kaj Mister Esperanto" (organizi la elekton). 41.Mitingo (organizi). 42.Murgazeta redakcio. 43.Muziko (organizi). 44.Neptun-festo (organizi kaj partopreni). 45.Oratora konkurso (organizi). 46.Paroliga grupo (gvidi, instrui). 47.Pedagogia Seminario. 48.Poŝto tendara. 49.Prelegoj en E-Universitato. 50.Registrado de venantoj. 51.Rektoro de la E-Universitato. 52.Revenaj biletoj (aĉeti). 53.Sociologia enketado (organizi). 54.Sportaj konkuroj (organizi). 55.Statistiko tendara (kompili). 56.Tajpistino tendara. 57.Tendara Estraro. 58.Teo vespera (organizi). 59.Tradukista grupo (gvidi). 60.Turista gvidanto en PP. 61.Verda milico. 62. Vesperaj ludoj (organizi). 63. Viktorino (organizi).

Ĉiu partoprenonta la tendaron devas laŭeble anticipe sciigi al Prepara Komitato, pri kiu tendara tasko li (ŝi) volus okupiĝi. Prepara Komitato notas le respondeculojn kaj, se estas bezono, proponas al apartaj partoprenontoj aliajn, ol tiuj petis, tendarajn taskojn. Ĉiu jam hejme pripensu plenumon de sia tendara laboro, preparu bezonotajn aĵojn kaj la planon sciigu al Prepara Komitato. Por la taskoj 15, 19, 24, 44 sin proponu E-kluboj.

Prepara Komitato de OrSEJT-20 (656099 Barnaul a/k 11)

## PROJEKTO DE TAGORDO POR OrSEJT-20

7.50 - 8.10 - ellitiĝo.
8.10 - 8.30 - matena gimnastiko.
8.30 - 9.00 - sinlavado, banado, naĝado en la lago.
9.00 - 9.30 - matena kunveno.
9.30 - 10.00 - matenmanĝo.
10.00 - 10.30 - libera tempo, kunsido de la Tendara Estraro.
10.30 - 12.00 - E-Universitato (nepra por ĉiuj), tradukista kurso.

12.00 - 12.30 - libera tempo, naĝado.
12.30 - 14.00 - paroliga, tradukista, eventuale aliaj kursoj.
14.00 - 14.30 - tagmanĝo.
14.30 - 16.00 - libera tempo, naĝado, sunbruniĝo.
16.00 - 17.30 - Pedagogia Seminario, instruado de novaj kantoj.
17.30 - 18.30 - pure privata tempo de la grupoj (preparo de hejmaj taskoj, demandoj al la instruistoj), prepariĝo al vesperaj aranĝoj, eldono de murgazeto, laboro de E-biblioteko ktp.
18.30 - 19.30 - konkuroj, konkursoj, viktorinoj ktp.
19.30 - 20.00 - vespermanĝo.
20.00 - 20.30 - libera tempo, prepariĝo al vesperaj aranĝoj.
20.30 - 22.30 - vesperaj aranĝoj.
22.30 - 24.00 - dancoj, ludoj, kantoj.
24.00 - 7.50 - firma dormo, silento en la tendara teritorio.

Prepara Komitato.

## NE NUR EL LINGVA VIDPUNKTO

La letero de V. Vjazovcev pri PP ("A"-6) estas direktita al L. Novikova, sed ankaŭ mi, kiel iniciatinto de PP, sentas devon reeĥi, kvankam pri la temo mi jam skribis (en "A"-11(44), bv. relegi!).

Devigi junajn homojn dum 10 - 15 tagoj sidi surloke sen konatiĝi kun naturo malsimila al la hejma, sen ebleco eksenti ĝuon de fizika agado estas malbona spritaĵo.Leginte la "malfermitan leteron", mi rememoris vortojn de la tendara kanto, proponita por Kieva SEJT: "Sed ne estas ni turistoj, nek sportistoj, nek kantistoj - estas ni esperantistoj en tendar'!". Tute en spirito de k-do Vjazovcev! "Nur esperantisto" estas eble genia, sed nenormaleco. La plimulto volonte parolus Esperante ne nur pri Esperanto. Ni tion konsideru.

Laŭ mi tute ne necesas 2500 radikojn enkapigi antaŭ ol veni la tendaron. Sufiĉas 600 - 800 kaj scio de la elementa gramatiko - ĉion ĉi necesas lerni hejme. PP devas prezenti al komencanto tion, kion ne ĉiam sukcesas doni la kluboj surloke - elementan konversacian lingvopraktikon. Granda grupo (tendaro) rapide dividiĝas je du pli-malpli konstantaj partoj - parolantoj kaj aŭskultantoj. En malgranda (PP-) grupo estas pli facile paroligi komencanton. En PP-grupo novico de mateno ĝis vespero estas antaŭ la okuloj de la gvidanto, en la tendaro - nur dum kelkaj instruhoroj. Juĝu mem, kiam pli efike eblas paroligi. Tasko de la grupgvidanto estas suflori temojn por konversaciado, peni ke anstataŭ nacilingve oni ĉion priparolu en Esperanto. Dum 3 - 4 tagoj eblas pli bone ol dum kiu ajn ekzameno esplori lingvomankojn de ĉiu grupano kaj rekomendi, laŭ kiu direkto devus tiu labori dumtendare kaj post la reveno hejmen.

PP celas ankaŭ faciligi adaptiĝon de novico al E-kolektivo (tendara). Ni ĉiuj scias, ke komencantoj longe sentas sin fremdaj post la apero en E-klubo (iuj pro tio ĉesas la vizitadon). En la tendaro komencanto-melankolulo, eĉ flegmulo povas ĝisvivi la fermon sen alparoli iun (kaj eĉ sen esti alparolita, kiam samurbaj aktivuloj dronas en E-aferoj). En PP-grupo ĉiuj estas lingve samrangaj - la komunikado faciliĝas, ankaŭ pro tio ke ĉiuj baldaŭ persone konatiĝas. La tendaran kolektivon PP-grupanoj eniros ne individue - estos pli facile adaptiĝi. Cetere, ĉu vi rimarkis, ke en E-klubo pli facile ekvivas ne izoluloj, sed grupetoj de amikoj?

Gvidi PP-grupon ne estas facile. Necesas scii adapti siajn planojn al lingvonivelo kaj interesoj de la grupo. La gvidanto estu preta ĉiuminute insisti (sed ne tede) pri uzo de Esperanto. Povas esti, ke iu grupgvidanto katenis sian grupon apud la tendaro mem - por forkuradi tien. Povas esti, ke iu alia provis formi la kolektivon per komuna drinkado. Sed ni ne juĝu pri la ideo de PP laŭ fuŝaj

ekzemploj. Ĉi-jaraj SEJToj okazos en tre interesaj regionoj de Sovetio. Ĉu eblas samtempe spertiĝi en Esperanto kaj ĝui la naturon? PP jam respondis: Esperanto kaj turismo ne estas antagonistoj.

V.Ŝilas (Vilnius).

## PROGRESANTOJ EN TENDARO

**Dankon al k-do Vjazovcev pro tiel brila artikolo en "Aktuale". Ni bezonas pli da similaj artikoloj en nia organo.** Sed teni paroligajn grupojn en unu loko side, kiel en antaŭaj tendaroj, - ni al tio ne konsentas. Sub "ni" mi komprenas minimume Barnaulan E-klubon kiu en sia diskuto pri la artikolo unuanime decidis: parolantaj grupoj devas esti piediraj. Alia afero estas, ke organizintoj de du antaŭaj tendaroj (Tiĥvin, Miass) trouzis la piediradon, pro kio ne sufiĉis tempo por la plej ĉefa - praktikado de la lingvo.

Dum la kluba diskuto ni decidis, ke piediraj grupoj devas ĉiutage marŝi 7 km aŭ eĉ malpli depende de la vojplano. Certe en la tendarejo restos grupo (aŭ du) el homoj kiuj ne povos piediri pro la sanstato aŭ tre ne emas tion.

Pri krokodilado. Pravas k-do Vjazovcev (kvankam tio estas delonga vero), ke "krokodiloj" ne devas esti en la tendaro. En antaŭaj tendaroj oni batalis kontraŭ krokodilintoj duonŝerce-duonserioze. En ĉi-jara tendaro ni severiĝos la batalon. Vere la nocion "krokodilo" oni komprenas tre larĝe. Mi kuraĝas proponi mian varianton: krokodilanto estas tiu, kiu uzas inter esperantistoj nacian lingvon ne dezirante (provi) paroli en Esperanto. Kaj ne nur progresanto povas esti "krokodilo", ni en la klubo havas du esperantistojn, kiuj emas krokodili kun progresantoj, ne dezirante instrui al ili la lingvon. Ni tamen ne forgesu ke ekzistas du tipoj de "krokodiloj": volaj kaj nevolaj. Pro tio estas granda eraro, ke iuj esperantistoj kroĉas al ĉiu ajn progresanto la nomon "krokodilo". Tio ofendas, forpuŝas progresantojn el nia kolektivo. Tiel ni povas perdi estontajn esperantistojn. Multajn vortojn progresantoj ankoraŭ ne sukcesis ellerni, kio puŝas al nacilingva parolado. La tasko de esperantistoj estas helpi al ili lerni. Ekzemple, ekaŭdis ni iun nacilingvan esprimon - tuj diru ĝin en Esperanto, petu ripeti, klarigu novajn vortojn ktp.

Laŭ mia opinio, en la lastaj tendaroj la esperantistoj pli malproksimiĝis de la progresantoj. Tiu procedo estas komprenebla: venas batalantoj por Esperanto, poetoj, lertantoj pri la lingvo; por ili estas pli interese kaj pli utile uzi la tempon por kontaktoj kun samniveluloj. Sekve ni devas teni iun ekvilibron: sperta esperantisto kaj kun aliaj spertuloj parolu-diskutu, kaj multon da tempo dediĉu ankaŭ al progresantoj. Mi volas anonci, ke OrSEJT-20 estos dediĉita plejparte al la progresantoj - rezervo de la E-armeo.

Se ni multon promesas al la progresantoj, ni ankaŭ postulos de ili la lingvan disciplinon. Jam en la unua-dua tago de la tendaro ni planas forpeti el OrSEJT unu-kelkajn obstinajn krokodilojn, en la sekvaj tagoj - laŭbezone. Ni petas ĉiujn klubestrojn averti pri tio la partoprenontojn de OrSEJT-20.

La ĝenerala skemo de laboro por esperantigo de progresantoj estas prezentota baldaŭ per aparta artikolo.

A.Gonĉarov (Barnaul).

## NE TIMU ERARI, HONTU KROKODILI

**La aŭtoro de la malfermita letero al L.Novikova videble estas maksimalisto.** Kiel estas konate, personoj de tiu speco estas malmaturuloj aŭ (kaj) malspertuloj. Krome, li ne bone scias la taskojn de SEJToj. Certe perfektiĝo en la lingvo estas unu el ĉefaj taskoj de la tendaroj, sed SEJT ne estas elementa kurso, kie la komencantoj

finfine "forigas dubojn pri uzo de la gramatikaj reguloj". Ajna E-renkontiĝo por la kursfininto estas unuavice plonĝo en la lingvan atmosferon. La lasta kuraĝigas lin paroli en Esperanto.

La aŭtoro plendas (ŝajne senkaŭze), ke liaj samklubanoj ne tre progresis en la lingvo. Pri tio kulpas ili mem kaj antaŭ ĉio la klubestro, kiu ne sukcesis anticipe agordi la tendumontojn, ne instigis ilin nepre mem lerni, kapti nekutimajn esprimojn, demandi, interesiĝi, kuraĝi paroli en la lingvo, honti krokodiladon (ne timi la "verdan policon", sed konscie honti). Ili ne atendu manaon el la ĉielo: konstantan memorigadon, puŝadon, metodikajn kaj pedagogiajn artifikojn de la grupestro, iu progresanto, spertulo.

Strangas la difino de la komencanto far la aŭtoro. Li asertas ke komencanto estas persono, kiu "havas preskaŭ 2500 radikvortojn en la kapo"(Zamenhof uzis nur 1294 radikvortojn) kaj "tralegis kaj tradukis almenaŭ 300 - 500 paĝojn en Esperanto". Se li eĉ post tio "missas la radikojn, kreas vortojn, ne estante certa ke kreas korekte", do la persono devas esti ne komencanto, sed idioto.

Tamen ni revenu al la tendaro. De unu flanko la aŭtoro malbenas PP-on (legu - turistan marŝadon), konsideras tiujn tagojn tute perditaj. Kaj pro kio? Ĉar la temoj dum la marŝado estas rapide pasantaj kaj ne memorfiksiĝas. Kaj la temoj estas tro teraj - valo, montgrimpado, preparado de fajro, manĝado. Sed sidante akademiece en la tendaro kaj aŭdante la vortojn de ĉiutaga vivo (kiujn vortojn?), oscedante pro enuo, la komencanto pli rapide encerbigos la frazojn. De alia flanko la aŭtoro alvokas, ke ĉiuj : la spertuloj, progresantoj kaj komencantoj - estu kune dum ripozaj (?) vesperoj, kiuj devas transformiĝi al instruado en naturaj kondiĉoj (!).

Endas scii, ke ĉiu kolektiva agado proksimigas la homojn, kaj la marŝado estas aktiva agado, kie oni helpas unu al alia. Bezonataj terminoj pli rapide enkapiĝas ol la abstraktaj. Ekz., ĉiu tuj memoros, ke pli rapide varmigas akvon betula trunko ol la pina.

Ĉiu partopreninto de OrSEJT-19 profunde dankas la organizintojn de la tendaro, kies animo estis L.Novikova. La aŭtoro malprave ofendis ilin kulpigante pri kvazaŭa malspritemo, ke ili ne povis plenigi la vesperojn per interesaj aranĝoj. La vesperoj ĉe Turgojak pasis tre agrable, bonege - tiel, kiel devis esti.

Se oni venis lerni, oni lernu dum ripozo, dum marŝado, naĝado, arbara promenado aŭ kolektado de brulligno. Lernu, demandu, komparu, memorfiksu. Kaj parolu, ne timu erarojn, iu nepre ĝentile, senofende korektos.

Vere estas, la lingvoinstruado lamis. La organizintoj pri tio ne kulpas. Por la dumtendara instruado sin anoncis ne multaj, fakte instruis nur Z.D.Skvorcova kaj mi. Mi havis ĉ. 40 lernantojn. Tio estis nefruktodona, ne eblis eĉ kontroli la donitajn taskojn, aŭskulti ĉiun. Plej konvena estas 8-10-persona grupo.

La aŭtoro pravas, ke la komencantoj kaj progresantoj vizitu la Universitaton, ke estu pridiskutataj metodikaj problemoj, la kluba vivo. Por pli efika instruado dum la tendaro mi proponas jenon:

1) La turista marŝado estu konsista parto de la tendaro kaj daŭru 3 - 5 tagojn, dum kiuj la grupanoj interamikiĝu kaj ekkonu plej bonajn trajtojn de la grupestro. La grupo konsistu plejparte el lingve samnivelaj personoj. Post la marŝado la grupestro daŭrigu la komencitan instruan laboron en la tendaro kun la sama grupo laŭ la plano, ellaborita de la Instrua fako.

2) La klubestro nepre sincere indiku la lingvonivelon de la tendumonto, por ke la organizantoj sciu al kiu grupo aligi lin.

3) La klubestroj emfazu al la rekomendatoj, ke la tendaroj estas ne nur sanigaj kaj amuzaj, sed - pli grave - seriozaj aranĝoj.

4) Ĉiu kapabla instrui ĉe diversaj niveloj nepre anoncu sin. Plej malfacile estas gvidi progresantojn - ege respondeca tasko!

E.Perevertajlo (Taŝkent).

ADRESARO DE SEJM-SUBTENANTOJ POR LA AGADJARO 1977/78
(je la 6-a de aprilo)

K o l e k t i v a j   s u b t e n a n t o j

1.Jerevana E-klubo: 375010, Abovjana 3, AOKS, Danieljan G.S.
2.Satka E-klubo: 456910 S.-3 Ĉeljabinskoj obl., d/v, Faizova F.Ĥ.
3.Tallinna E-klubo: 200001, ab. ja. 134

I n d i v i d u a j   s u b t e n a n t o j

1.Andrejev V.G.: 454000 Ĉeljabinsk, ab. ja. 98
2.Andrianova N.N.: 252173 Kiev, pr. Tyĉiny 26 - 162
3.Auderskaja T.V.: 270100 Odessa, Korolenko 5b - 26
4.Aukŝtikalniene B.P.: 235250 Pasvalis Lit. SSR, Janonio 27
5.Bajaĥmetov T.U.: 490050 Semipalatinsk, glavpoĉtamt, do vostreb.
6.Baltruŝiene A.: 233023 Kaunas Lit. SSR, Vyduno 1 - 15
7.Baradosova M.: 418440 Aksaj Uralskoj obl., Privokzalnaja 90
8.Baryŝnikova E.: 433510 Dimitrovgrad-4 Uljanovskoj obl., Stroitelej 24 - 3
9.Batnja P.P.: 228400 Daugavpils Latv.SSR, Ziemelju 7a - 8
10.Berezin G.D.: 343100 Krasnoarmejsk Doneckoj obl., pr.Lenina 27-8
11.Beŝkaŕev V.P.: 603137 Gorkij P-137, pr. Gagarina 222 - 95
12.Bingelis V.R.: 234670 Marcinkonys Varenos raj. Lit. SSR
13.Biĥert D.I.: 664046 Irkutsk, Bajkalskaja 130
14.Bojev S.N.: 480032 Alma-Ata, Institut zoologii
15.Bojko P.F.: 323010 Pavlograd Dnepropetrovskoj obl., Volodarskogo 22 - 87
16.Bondareva I.Z.: 238700 Sovetsk Kaliningradskoj obl., Krasnoarmejskaja 11 - 12
17.Borisov L.N.: 140402 Kolomna Moskovskoj obl., Dzerĵinskogo 21-27
18.Bronŝtejn M.C.: 187500 Tiĥvin Leningradskoj obl., ab. ja. 2
19.Budkov P.F.: 213722 Ĵornovka Osipoviĉskogo raj. Mogiljovskoj obl.
20.Bukats J.: 226011 Riga, Veidenbauma 35 - 29
21.Burgmeister M.: 226001 Riga, ab. ja. 55
22.Bystrickij S.V.: 690068 Vladivostok, Kirova 14/2 - 15
23.Ĉeliauskas P.P.: 235745 Ŝvekŝna Ŝilutes raj. Lit. SSR, Partizanu 9
24.Ĉernov V.I.: 248016 Kaluga, Barrikad 126 - 20
25.Ĉujkova I.V.: 398005 Lipeck, Parkovaja 10 - 102
26.Dagys J.: 232000 Vilnius, Lenin-placo 9 - 16
27.Ebel (Citlau) R.L.: 656099 Barnaul, ab. ja. 83
28.Ernits Virve: 200012 Tallinn, Mahla 65 - 1
29.Gabŝys A.M.: 235054 Gudĵiunai Kedainiu raj. Lit.SSR, Devinduoniai
30.Granat B.A.: 394026 Voroneĵ, Jeremejeva 27 - 25
31.Grigaitis V.: 232015 Vilnius, Ĵemaites 1 - 86
32.Grikpedis M.P.: 231213 Gervjaty Ostroveckogo raj. Grodnenskoj obl.
33.Grinŝpan R.G.: 700125 Taŝkent, Visokovoltnij massiv, Sajfulina 4
34.Guk A.A.: 347900 Taganrog Rostovskoj obl., ab. ja. 43
35.Ĝilkibajeva A.: 483145 s/ĥ im. Ĉapajeva Kaskelenskogo raj. Alma-Atinskoj obl., Internacionalnaja 17
36.Ĥomiĉ E.K.: 350000 Krasnodar, ab. ja. 4
37.Inokaitiene E.: 235045 Ŝeta Kedainiu raj. Lit. SSR
38.Ionesov A.I.: 703000 Samarkand, Sovetskaja 53
39.Ivaniŝĉenko G.Je.: 315500 Lubny Poltavskoj obl., Novoproloĵennaja 6 - 14
40.Ivasenko A.I.: 350042 Krasnodar, do vostrebovanija
41.Izmajlov S.A.: 182100 Velikije Luki Pskovskoj obl., Pograniĉnaja 1/61
42.Jeroĥin V.: 140406 Kolomna Moskovskoj obl., Okskij prosp. 5a-14
43.Judickiene A.: 232044 Vilnius, Karoliniŝkiu 24 - 93
44.Kaĉalina Z.I.: 334807 Feodosija Krimskoj obl., Lunaĉarskogo 4-2
45.Kalninŝ A.R.: 226017 Riga, Kalnciema 126 - 2
46.Kapanadze E.N.: 380077 Tbilisi, pr. V.Pŝavela 26 - 102
47.Kapustin L.G.: 603115 Gorkij, Nevzorovoj 72 - 7

48.Kilčiauskas R.: 235300 Panevežys Lit. SSR, Bites 11a - 1
49.Kilk A.K.: 200090 Tallinn, ab. ja. 264
50.Kirillova N.S.: 399740 Jelec Lipeckoj obl., Kommunarov 103 - 71
51.Kivajev Ju.P.: 424000 Joškar-Ola, ab. ja. 50
52.Koba A.F.: 324099 Krivoj Rog Dnepropetrovskoj obl., ab. ja. 18
53.Kogan A.B.: 187500 Tiĥvin Leningradskoj obl., ab. ja. 2
54.Koljĉuk V.A.: 169900 Vorkuta Komi ASSR, Glavpočtamt, do vostreb.
55.Koroljov I.P.: 659316 Bijsk Altajskogo kraja, ab. ja. 5
56.Kotelnikov A.K.: 400015 Volgograd, G.Koroljovoj 9 - 19
57.Kulikov V.V.: 644007 Omsk, Sazonova 33
58.Kutlubajeva R.Ja.: 141300 Zagorsk-2 Moskovskoj obl., do vostreb.
59.Kuznecov S.N.: 103050 Moskvo, Gorkogo 19 - 67
60.Laanest L.E.: 203051 Harku Harju raj. Est. SSR, Instituudi 16-18
61.Laptev V.V.: 454084 Čeljabinsk, pr.Sverdlovskij 39 - 4
62.Laur A.H.: 200003 Tallinn, Niidi 8 -2
63.Lineckaja M.Ja.: 252030 Kiev, ab. ja. 644
64.Lineckij M.Ja.: 252200 Kiev, ab. ja. 539/1
65.Ljut V.A.: 226016 Riga, Lemešu 13 - 30
66.Lobastova G.V.: 453200 Salavat Bašk. ASSR, Gorkogo 30 - 11
67.Losev L.A.: 663260 Ĥatanga Krasnojarskogo kraja, do vostrebovan.
68.Lukoševičius T.: 235300 Panevežys Lit. SSR, Radastu 22 - 2
69.Majboroda V.G.: 244000 Sumy, 2-ja Naberežnaja strelki 21
70.Matiukas B.: 234150 Moletai Lit. SSR, ab. ja. 11
71.Mekys A.: 232000 Vilnius, ab. ja. 149
72.Mikk A.M.: 202900 Viljandi Est. SSR, Jakobsoni 3 - 2
73.Mirosov G.S.: 453200 Salavat-11 Bašk. ASSR, do vostrebovanija
74.Mitroŝĉuk N.A.: 662000 Bogotol Krasnojarskogo kraja, Elevatornaja 13 - 13
75.Muraškovskij Ju.S.: 310075 Ĥarkov, pr. Kosiora 140 - 71
76.Neeme F.: 202240 Kehra Est. SSR, Kooli 6 - 26
77.Nikulŝin V.I.: 460000 Orenburg, Krasnoznamjonnaja 9a - 3
78.Noĉovkin V.Je.: 314000 Poltava-počtamt, do vostrebovanija
79.Oĥotin M.M.: 334156 Melničnoje Belogorskogo raj, Krimskoj obl.
80.Ojalo J.: 200001 Tallinn, Narva mnt 23 - 5
81.Opletajev V.V.: 626400 Surgut-1 Tjumenskoj obl., Dekabristov 19-1
82.Pacjurko V.P.: 292080 Pustomyty Lvovskoj obl., 1 Maja 5/6
83.Palkin I.I.: 117449 Moskvo V-449, Švernika 7 - 3 - 44
84.Palu J.J.: 200016 Tallinn, Sõlme 21
85.Pavljukovec A.A.: 225650 Luninec Brestskoj obl., ab. ja. 17
86.Pervuĥina T.N.: 627100 Zavodoukovsk-1 Tjumenskoj obl., Oktjabrjskaja 62
87.Podinja N.D.: 228400 Daugavpils-4 Latv. SSR, Titova 27 - 8
88.Podkaminer S.N.: 197010 Leningrad P-10, Školnaja 48 - 7
89.Poljakov V.G.: 142200 Serpuĥov Moskovskoj obl., Radĉuka 7 - 6
90.Prokudina V.N.: 453200 Salavat Bašk. ASSR, pr.Neftjanikov 13-69
91.Ramonas A.P.: 235030 Kedainiai Lit. SSR, ab. ja. 15
92.Raus E.: 200021 Tallinn, do vostrebovanija
93.Riis V.A.: 203600 Pärnu Est. SSR, Riia 78 - 19
94.Rudževičius V.: 233009 Kaunas Lit. SSR, R.Armijos 222 - 525
95.Rybakov M.D.: 140411 Kolomna Moskovskoj obl., Kirova 30 - 45
96.Samodaj V.V.: 113519 Moskvo, ul. Krasnogo Majaka 8 - 2 - 107
97.Sebeckas A.: 235700 Palanga Lit. SSR, Klaipedos 2
98.Seljugin G.S.: 182310 Pustoška Pskovskoj obl., p/o Kopylok, der. Moljgino
99.Semko V.M.: 293720 Drogobyĉ Lvovskoj obl., Borislavskaja 95 - 12
100.Sevak G.G.: 375010 Jerevan, ab. ja. 78
101.Sibirceva V.D.: 399949 Buĥovoje Čaplyginskogo raj. Lipeckoj obl., ul. Centralnaja
102.Skakunov I.I.: 252133 Kiev, bulv. Lesi Ukrainki 24b - 71
103.Skiezgelas A.A.: 235800 Klaipeda Lit. SSR. ab. ja. 179
104.Smildziņš A.: 226016 Riga, Lemešu 17 - 13

105.Sobanskij L.A.: 234090 Ŝalĉininkai Lit. SSR, ŝkola-internat k.9
106.Sokolova N.: 228409 Daugavpils Latv. SSR, Meĵa 36 - 1
107.Solovjov V.S.: 335000 Sevastopol Krimskoj obl., Majakovskogo 6 - 12
108.Soskina S.K.: 226055 Riga, Lidonju 20 - 7
109.Striuĵas V.: 235280 Birĵai Lit. SSR, Radvilos 4 - 5
110.Ŝipov V.V.: 446721 Birinsk Ŝisonskogo raj. Kujbiŝevskoj obl.
111.Ŝiŝko V.R.: 220086 Minsk, Slavinskogo 17 - 81
112.Ŝmajenos L.V.: 343871 Avdejevka Doneckoj obl., Poĉtovaja 23, PTU N°43
113.Ŝtin N.F.: 610000 Kirov, Maklina 30 - 35
114.Tamoŝiunas J.: 232000 Vilnius, ab. ja. 38
115.Tartyŝev Je.A.: 610000 Kirov, Truda 13 - 4
116.Tkeŝelaŝvili G.K.: 380060 Tbilisi, Pavlova 4a - 7
117.Toom A.: 202301 Porkuni Est. SSR
118.Vaitilaviĉius A.: 232043 Vilnius, Arĥitektu 88 - 48
119.Valaŝinas K.: 235240 Joniŝkelis Pasvalio raj. Lit. SSR, Ĉernjaĥovskogo 53
120.Vasiljeva E.N.: 344030 Rostov-Don, Varfolomejeva 128
121.Virŝila J.: 235720 Palanga Lit. SSR, Medĵiotoju 36
122.Vizgirdas A.-P. P.: 235800 Klaipeda Lit. SSR, ab. ja. 167
123.Vjazovcev V.N.: 453200 Salavat Baŝk. ASSR, pr.Neftjanikov 5-12
124.Vojnaroviĉ A.I.: 343871 Avdejevka Doneckoj obl., Gagarina 23-37
125.Vtorova T.I.: 400031 Volgograd, Rossijskaja 10 - 55
126.Zajdman Je.S.: 334200 Jalta Krimskoj obl., Kirova 26 - 10
127.Ziskandoviĉ M.A.: 630087 Novosibirsk, ab. ja. 33

Kompilis vicprezidantoj de SEJM D.Cibulevskij, P.Jegorovas

## MAGNETOFONA SERVO LABORAS

Post iomdaŭra interrompo la magnetofona servo reeklaboris. Bedaŭrinde, tio ne okazis pli frue pro diversaj kaŭzoj.

Estis tempo, kiam la servo, gvidata de A.Rogov, funkciis bone. Tamen la nuna stato ne estas brila. Unue - pluraj havataj E-surbendigoj estas malaltkvalitaj, precipe tiuj de koncertoj dum tendaroj, renkontiĝoj, klubkunvenoj. Estas ankaŭ hazardaj surbendigoj. Laŭ mia opinio, por surbendigi iun koncerton, renkontiĝon persono okupiĝanta pri tio devas pli akurate ĉion antaŭvidi, eble provludi kun parolanto, plenumanto ktp. Des pli, se vi ekzemple deziras surbendigi kunvenon, vesperon de via klubo. Tamen estas parto de surbendigoj, kies kvalito estas sufiĉe bona kaj certe bona.

La servo dume havas nur unu SEJM-magnetofonon. La dua estas propraĵo de esperantisto-junecano, kiu ja ankaŭ deziras iam aŭskulti muzikon hejme. Do necesas baldaŭ akiri la duan bobenan magnetofonon. Krome, venos la somero, komenciĝos renkontiĝoj, tendaroj, sekve necesos aĉeti almenaŭ unu porteblan. Mi opinias, ke la vicprezidanto de SEJM pri financoj min subtenos kaj asignos bezonatan sumon.

Nun estas ebleco surbendigi materialojn nur sur bobenoj, kun rapido 4, 9 kaj 19 cm/s (magnetofono "Kometa"). La servo disponas iom da novaj bendoj, sed la kvanto ne estas granda kaj ili restu nur por la servo mem. Do dezirantoj havi surbendigojn sendu purajn bendojn. Pli detala instrukcio kaj la listo de surbendigoj (24 titoloj, kun indikoj pri kvalito kaj longo) riceveblas laŭ la adreso: 232000 Vilnius, a/k 198, Gaidamaviĉius Stasys Jono.

Mi proponas temaron de surbendigoj, kiujn mi atendas de kluboj, subtenantoj: 1) prelegoj pri E-historio, movado; 2) E-lecionoj por kursoj; 3)rakontoj de E-veteranoj; 4) artaj programoj de E-vesperoj, renkontiĝoj; 5) kantoj, sociaj ludoj. Precipe grandan atenton ni donu al la 3-a temo: tio povas multon doni al nia historia fako. Kompreneble, ĉiu surbendigo estas ege utila dum E-kursoj, renkontiĝoj, klubaj kunvenoj, vesperoj.

Por la magnetofona servo estas bezonataj kunlaborantoj - membroj de la servo. Anoncu vin: vi okupiĝos pri interesa laboro. Mi invitas kunlabori ankaŭ aliajn fakojn - historian, populariĝan, scienc-teknikan k.a.

S.Gaidamavičius, estro de la servo.

## ĈU EN LA KLUBO AŬ EN SEJM?

1.Agado. Konsiderante la kondiĉojn de malgranda urbeto, kia fakte estas Tiĥvin, nia klubo agas aktive. La ekspozicion de politikaj porpacaj afiŝoj ni organizis komence de la pasinta jaro, sed pro multaj anoncoj en E-gazetaro la afiŝoj ne ĉesas veni. Pro tio ni jam povas paroli ne pri ekspozicio, sed pri kolekto de porpacaj afiŝoj. Novveninta parto de tiu kolekto formis novan ekspozicion, kiun la klubo aranĝis en la urba Kulturdomo. Poparte la kolekton spektis la urboj Ŝumen (Bulgario) kaj Samarkand. Kreskanta aŭtoritato de la klubo helpis aperigi fine de la pasinta jaro du artikolojn en la uzina ĵurnalo "Kirovec", eldonata en Leningrado. Tio estas grava sukceso, ĉar jam dum jardekoj eĉ ne unu pozitiva mencio pri Esperanto aperis en leningrada gazetaro. Laŭ mendo de la redakcio ni preparis por publikigo serion el 9 artikoloj pri la internacia lingvo kaj ĝia rolo en laboro de nia klubo.

En oktobro 1977 post informaj prelegoj bone eklaboris E-kurso por komencantoj. Estas preparita por eldono kaj jam aperinta la rusa-Esperanta frazaro de V.Gakalenko. Endas mencii la ekspozicion pri internacia junulara turismo, vesperojn de "Diskoteko" por uzinaj komunloĝejoj kaj duonpretan katalogon de postmilitaj E-insignoj, aperintaj en nia lando.

La laboro estus multe pli vasta kaj la rezultoj multe pli abundaj, se ĝin ne malhelpus kelkaj obstakloj. Unu el tiuj laŭ mi estas pridiskutenda en "A", ĉar ĝin spertas verŝajne ĉiuj kluboj.

2.Dilemo. Kiel Klubo de Internacia Amikeco, la nia estas sufiĉe amasa. Preparon de diversaj klubaj aranĝoj, rekte aŭ nerekte ligitaj kun Esperanto, partoprenis ĉ. 50 personoj. Ni reduktu tiun kvanton ĝis 10: tiom da aktivuloj pli-malpli konstante vizitas la klubon. Duono el ili spertas memstare organizi laboron en certaj branĉoj de la kluba agado. Kaj jen, konsiderante la lastan kvanton, mi volas diri pri unu fenomeno, kiun mi nomu ekz. "fenomeno de Kogan".

En nuna stato de sia evoluo SEJM bezonas jam sufiĉe multajn personojn, kiuj okupu sin pri pure movadaj demandoj: Komitato, fakestroj ktp. Do, A.Kogan, kies nomon mi uzis por titoli la fenomenon, estras la Terminaran Centron ĉe STF de SEJM. Kun nia dua aktivulo, V.Gakalenko li plenumas tre gravajn taskojn por la Movado: gvidas kaj kontrolas laboron de ĉ. 20 kunlaborantoj el diversaj urboj, ordigas la rezultojn de tiu laboro, konstante kontaktas kun TC de ISAE kaj similaj organizaĵoj, filmigas teknikajn E-terminarojn kaj sendas la mikrobendojn laŭpete al ĉiu bezonanto.

Ĉu donas la menciita laboro utilon al SEJM kaj ĝenerale al E-movado? Sendube. Ĉu povas la homo, okupiĝanta serioze pri tiom vasta kaj grava laboro, dediĉi sin ankaŭ al iuj internaj porurbaj aranĝoj de la klubo? Dubinde. Ni apenaŭ povas nomi similan homon klubano, ĉar lia utilo por la klubo estas preskaŭ nula.

3.Al oponantoj. Jes, ne nula, sed preskaŭ. De unu flanko, fine de ĉiu agadjaro li donos al la klubo 40 poentojn (maksimume!) laŭ raporto de sia fakestro. Laborante en la klubo, li per prelegoj, artikoloj, kursoj ktp. alportus ne malpli ol 200 - 300 poentojn. De alia flanko, pro troa specialeco la laboro ne estas interesa por vastaj rondoj kaj ĝia propaganda efiko estas pure nula por la urbo. Do, kie labori: en SEJM aŭ en la klubo?

Oponantoj diros: trovu konvenan ekvilibron por labori ambaŭdirekte. Ja ekzistas apude alia fenomeno, ni nomu ĝin "fenomeno de

Sapoĵnikov": la krasnojarskano sukcesas agi kiel prezidanto de la urba klubo kaj samtempe kiel vicprezidanto de SEJM. Nun mi diru, ke interalie ankaŭ A.Kogan estas prezidanto de la klubo. Kaj mi invitas vin al simpla kalkulo.

Dume neniu elpensis pli ol 24-horan diurnon. Vi dormas kutime dum 7 - 8 horoj kaj manĝas dum 2 - 3 horoj tage - tion vi ne povas eviti, ĉu? Plue, dume en nia lando Esperanto vivtenas unusolan personon. Ceteraj devas labori aŭ studi - okupi sin pri la aferoj, ĉe la plejmulto tro foraj de la lingvo internacia. Tiu okupo konsumas 9 - 10 horojn tage. Ni paŝu plu: imagu, ke vi tute ne havas familiajn aferojn. Por libroj, sporto, banejo, kinejo, amindumo ktp. lasu la ripoztagojn. Eĉ kun tiuj kondiĉoj vi havos nur 3 - 6 horojn da libera tempo ĉiutage. Ni konsideru ankaŭ, ke okupon de homo oni povas taksi kiel seriozan, se li dediĉas al ĝi ne malpli ol 3 - 4 horojn tage.

Kiel konkludo el ĉio supredirita sekvas, ke vi kapablas havi nur unu seriozan okupon krom la ĉefa laboro. Kaj la abstrakta nocio "E-agado" jam ne povas esti taŭga nomo por tiu okupo. Se iu provas okupiĝi pri du aŭ tri aferoj samtempe kaj serioze, neeviteble iuj el tiuj okupoj lamas. Se li tamen certigas vin, ke li en ĉiu afero agas egalsukcese, sendube li mensogas aŭ estas simpla diletanto.

Kion oferi do? Eble vi scias...

M.Bronŝtejn (Tiĥvin).

MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO

LA REDAKCIO RICEVIS

"KF-2" - informilon de la kolektanta fako. Ĝi enhavas daŭrigon de la membrolisto (ĝis 64), anoncojn pri akireblaj E-aĵoj.

o

ANKORAŬ DU PAŜOJ ANTAŬEN

La 26-an de marto realiĝis la unua komuna ideo de Krasnojarska urba Konsilantaro de interkluboj: okazis dimanĉlaboro de geaktivuloj el ĉiuj komune agantaj aliĝintaj kluboj. Partoprenis ĉ. 60 geamikoj el 5 kluboj. La salajron oni decidis fordoni al Organiza Komitato de Tutmonda junulara festivalo en Habano.

Laŭ invito de la urba VLKSM-komitato, prezidanto de la E-klubo V.Sapoĵnikov partoprenis ties plenkunsidon la 30-an de marto kaj havis 10-minutan parolon pri agado kaj problemoj de la klubo. Ĉ.150 partoprenintoj akceptis la parolon favore, kun intereso.

AL LA AŬTOROJ

La lasta antaŭkonferenca numero de "A" aperos junie. Ĝi estas planata kiel duobla (por junio - julio), do 16-paĝa aŭ pli. Pro tio, kaj ankaŭ pro eventuala partopreno de la redaktoro en scienca konferenco en Novosibirsk ekde 18.6., la fermodato estas transmetata de la 10-a al la 5-a de junio. Aperigo de materialoj ricevotaj post tiu dato, eĉ se menditaj kaj enhave taŭgaj, ne estas garantiata. Bonvolu zorgi pri la ĝustatempeco de viaj kontribuaĵoj.

EN LA SEKVA NUMERO

- artikolo de D.Cibulevskij pri financaj problemoj en SEJM
- informaj artikoloj pri kluba agado (Doneck, Lvov, Salavat k.a.)

LA KOMITATO DE SEJM GRATULAS LA LEGANTOJN OKAZE DE LA UNUAMAJA FESTO KAJ DEZIRAS FRUKTODONAN SOCI-UTILAN LABORON!

---

La informilo estas uzenda nur enlande! Fintajpita 16.4.78.
Ĉiujn materialojn por "A" sendu al 121019 Moskvo d/v Aroloviĉu V.S.